Mirinda kosma liturgi'

(originale verkita en Esperanto) • M: Veni creator Spiritus (Mainz)



3. En nordo kaj en orient', / en sudo kaj en okcident':
estaĵoj ĉiuj gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

4. Antarkto, Amerik', Azi', / Eŭrop', Afrik' kaj Aŭstrali':
La kontinentoj gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

5. La alizeo, la muson', / tajfuno, trombo kaj ciklon':
La ventoj, Dio, gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

6. Ros-guto, pluvo kaj neĝer', / nebulo, prujno kaj hajler':
Precipitaĵoj gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

7. Glaci' eterna, alt-montar', / preri', dezerto, pra-arbar'
per nura esto gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

8. Salik', feniko, tamarik', / larik', miriko, miristik':
La arboj, Dio, gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

9. Krokuso, roz', tulip', viol', / kolĉik', aster' kaj gladiol':
La floroj, Dio, gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

10. Tritik', sekal', horde', maiz', / aven', milio, sorg' kaj riz':
Poacoj ĉiuj gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

11. Skarabo, muŝo kaj libel', / formiko, papili', abel':
Insektoj, Dio, gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

12. Vipur', natrik', igvan', varan', / aligatoro kaj kajman':
La reptilioj gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

13. Paruo, pego kaj paser', / fulik', anaso kaj anser':
La birdoj, Dio, gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

14. Leono, tigro, leopard', / panter', uncio kaj gepard':
La grandaj katoj gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

15. Marteso, lutro, lup', mustel', / ŝakalo, urso, vulp' kaj mel':
La hundoformaj gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

16. Angilo, perko kaj barbi', / ezoko, ŝarko kaj lofi':
La fiŝoj, Dio, gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

17. Sireno, orko kaj focen', / mar-elefanto kaj balen':
La mar-gigantoj gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

18. Jacinto, jado kaj grenat', / oniks', opalo kaj agat':
Juveloj, Dio, gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

19. Liuto, fluto, violon', / tambur', trumpeto, kariljon':
Muzikaj sonoj gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

20. Kristano, judo, islaman', / hindu', daŭisto kaj budhan':
La religioj gloras Vin. / Kun ili mi adoras Vin.

21. Mi Vin adoras, Triunu', / Vin, glora Patro, Vin, Jesu',
Spirito Sankta, same Vin, / hodiaŭ, morgaŭ kaj sen fin'.

Amen.

MIRINDA KOSMA HARMONI' • M (Veni creator Spiritus): Kempten ĉ. 1000, Wittenberg 1524, Mainz 1947, kp. ADORU 347 • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2022-06-13

Ĉi kanto havas la formon de ambrozia brevier-himno, same finiĝanta per doksologio kaj ameno.

La strukturo, pro la ĉiam sama lasta linio, similas iom al litanio. Oni eĉ povas provi divers-maniere alterni.

Oni povas elekti strofojn kaj/aŭ preni ilin kiel bazon de bild-meditado.

Simile al la konataj kvartet-ludoj, ĉiu strofo entenas terminojn el unu kategorio, nur ke ilia nombro ne estas kvar, sed rezultas el rimo, ritmo kaj bel-sono.

Verku mem pliajn strofojn,
ekz. pri riveroj, insuloj, urboj, etnioj, elementoj ...!